

EKO 2021

Esperigaj Komunikoj

Je via servo tra ok
jaroj, de post 2013
2020: rekorda jaro:
kun 60 komunikoj
Subtene al la loka,
landa, faka kaj
regiona agado

EKO 2021-20 sendita el Budapeŝto la 26an de majo.

Al: Komitato, sekcioj kaj aktivuloj de ILEI, Landaj kaj Fakaj Asocioj de UEA (aliĝintaj kaj ne). Plie al la Komitato, Konsilianoj, regionaj komisionoj de UEA, TEJO-estraro, gazetaro, partoprenintoj en iuj AMO-seminarioj, aliaj listoj kaj unuopuloj. Pli ol 1500 ricevantoj. Kun plusendoj pli ol 2000.

Por tuja uzo kaj plia diskonigo inkluzive de la alkroĉaĵoj kun indiko de fonto: EKO de ILEI kaj UEA

AMO viva, AMO alkroĉita, AMO amase

AMO 73: Tiu evento okazos en la 30a de majo (dimanĉe), ĝia programo disiris kun EKO 18. Depost tiam venis pliaj petoj por kontribui kaj IKEF provas trovi manieron aldoni ilin. Bunta programo, kaj post ega inter-korespondado, la seminario devos esti realtempe sekvebla en la kanalo UEA-Viva ekde 14:00 laŭ Centreŭropa tempo (CEST). Vidu detalojn en la Eventa Servo de UEA.

AMO 74: Tio okazos en la 22a de julio (ĵaŭde) ene de la Virtuala Kongreso (VK). La temo ege gravas kaj urĝas: Kiel altiri pli da junaj membroj tra Eŭropo. Ni nun alkroĉas la enkondukon por tiu seminario. Bv. legi tion kaj partopreni kun ideojn kaj la preteco kontribui al la bezonataj solvoj!

AMO 75-77: Ĉiuj en aktiva preparo. Iliaj enkondukoj sekvos per estontaj EK-komunikoj.

HISTORIO DE IKEF

DE INTERNACIA KOMERCA KAJ EKONOMIA FAKGRUPO
AL INTERNACIA KOMERCA KAJ EKONOMIA FEDERACIO
Omaĝe al AMO73 – IKEF
Retkunveno en 30a de Majo 2021



*Preleganto: Honora prezidanto de IKEF,
sro Roland Rotsaert unu el fondintoj*

*Anstataŭleganto: Vicprezidanto de IKEF,
sro Ludoviko ZHAO Chenghua*

Servo subtenata de
Universala
Esperanto-Asocio
kaj Internacia Ligo
de Esperantistaj
Instruistoj



Redaktoroj:
Stefan MacGill kaj
Mirejo Grosjean



ENHAVO

- AMO 73 kaj 74
- Estrara raporto
- Rusiaj tagoj
- Muzikaĵoj
- Filmo el Benino

Jen la Estrara Raporto 2020 de UEA

Tiu dokumento estas ĵus aperinta en la [junia numero](#) de la revuo *Esperanto* kaj pri kiu la Komitato baldaŭ voĉdonos. La financa parto de la raporto sekvos.

Ĝi estas disponebla en la komitata Teko (uea.org/teko/komitato):

https://uea.org/l/teko/komitataj/Junio_2021_Estrara_Raporto_2020.pdf

Aleks Kadar, ĝen. Sekr. De UEA

Landa aranĝo en Rusio

La Estraro de REU decidis pri okazigo de la landa aranĝo «Rusiaj Esperanto-Tagoj» ĉi-jare. RET-2021 okazos ekde la 15-a ĝis la 22-a de aŭgusto en Dagestano, en bazejo sur la Kaspia marbordo proksime al Maĥaĉkala (je 20 minutoj de veturado de la urbo).

Legu la informleteron <http://reu.ru/kalendaro/informletero/RET-2021>

kaj aliĝu <http://reu.ru/kalendaro/alighilo/RET-2021/>

Du muzikaĵoj + unu poemaro = kulturo

Bela Marieto – Kajto

Teksto kaj melodio de Liven Dek: <https://youtu.be/gSaGZZDe8OI>

Mayoma kantata

Aperis la albumeto 'Marta kaj JOmo kantas MAYOMA-n'

<https://www.vinikosmo-mp3.com/eo/blogo/190-apero-de-la-albumeto-marta-kaj-jomo-kantas-mayoma-n.html>

Bronŝtejn buntas verse

Mikaelo Bronŝtejn prezentas sian plej freŝan poemaron "Viv-teatro". Ni invitas spekti la filmeton, "ŝati", aboni nian jutuban kanalon kaj disvastigi la ligilon:

<https://www.youtube.com/watch?v=QgwNKF8n5dl>

Ne forgesu, ke AMO 75 en Greziljono (ekde julio 26) temos pri Kulturo en Esperanto.

Konatiĝu kun rusa pioniro

Anna Striganova intervjuas konatan rusian esperantiston Valentin Melnikov en Esperanto. Ni invitas spekti la filmeton, "ŝati", aboni nian jutuban kanalon kaj disvastigi la ligilon:

<https://www.youtube.com/watch?v=Vdlf-j6OJHA>

La esprimo 'intelekta ludo', estas ankaŭ konata kiel 'kvizo'. Daŭro:21 minutoj.

Epokfara kaj spektinda filmo kreita en Burundo

Dankon Kwibe: *La heredaĵo*. Miriadaĵo Film, Burundo, aprile 2021. 30-minuta HD-filmo spektebla senpage en Jutubo:

https://www.youtube.com/watch?v=hX097I5C_k

La heredaĵo estas nova filmo realigita de la DR Kongano Dankon Kwibe en du partoj. La unua parto estis anoncita al la esperantista publiko la 20-an de aprilo 2021. Estas filmo, kiu reliefigas konkretajn problemojn, kiel edziĝon kun la vidvino de la frato, postulojn de la socio rilate al viro kaj favorojn al virino. Mallonge, la filmo prezentas enrigardon pri kelkaj tradiciaj praktikoj, kiuj bremsas aŭ malkuraĝigas la procezon de virina emancipiĝo en Afriko.

Kwibe, la ĉefa rollulo, post la morto de la frato edziĝis kun ties edzino laŭ lokaj tradiciaj postuloj kaj tiel heredis la bonhavaĵojn de la mortinto. La juna paro dediĉis sin al trankvila familia vivo sufiĉe plena de reciproka amo. Ĉiutage la edzino dommastrumas, prizorgas la infanon kaj preparas la revenon de la edzo, kiu iras labori ĝis iam ĉio ŝanĝis: la edzo decidis havi duan edzinon...



Dankon Kwibe en fotoj senditaj de Mirejo Grosjean, el 2018

Temas pri interesa, pensiga filmo kun subtekstoj en la angla lingvo realigita en afrika etoso. Malgraŭ malbona prononcmalmaniero de kelkaj aktoroj, ŝokaj paroloj kaj agoj ĉe la filmfino – kio donas impreson pri manko de respekto al virino – la kinaĵo estas vere spektinda ankoraŭ, ke la rezulto teknike estas admire bonkvalita kaj la rolluloj tre elturniĝemaj kun limigitaj rimedoj.

Dankon Kwibe meritas kuraĝigon per ŝato pri sia filmo kaj krom tio, ankaŭ subtenon por vivteni sin kaj precipe por povi en mallonga periodo realigi en bonaj kondiĉoj la duan parton de sia projekto.

Verkinto nekonata; EKO rekomendas la filmon.

===== vortoj: 610 =====

Ĉi tiu komunikado estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde. Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

Aperintaj komunikadoj legeblaj kaj elŝuteblaj ĉe: <http://aktivulo.net/eo/content/komunikoj-pri-agado>. La prezento estas ĝisdata ĝis la fino de marto 2021 (per EKO 2021-12).. Vidu ilin laŭjare, kun klaraj enhavaj indikoj por ĉiu jaro.

ALDONU VIN: Skribu al <stefan.macgill<ĉe>gmail.com>. Neniu alira kondiĉo aldone al valida retadreso. Malferma al Aligitaj Membroj, eksmembroj, neniam-membroj, klingonuloj, volapukistoj, atistoj, itistoj, ujistoj, iemuloj, Duolingintoj, ktp.

SUBTRAHU VIN: Skribu al la supra adreso. Donu vian nomon, retadreson, landon kaj (se eble) la grupon aŭ kialon por via ĉeesto en la ekspedolistoj.